

SEPTEMBRO 2002

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2002:4

Rapport från internationella
esperantokongressen i
Fortaleza, Brasilien. (S.3-6)



Sverige tar över flaggan

Nästa år internationell
esperantokongress i Göteborg

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
 Septembro 2002 • 90-a jarkolekto
 Fondita en 1913

Redaktion:
 Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:
 Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
 113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: espero@esperanto.se

Ansvärlig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi och Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2001: 200 kr.
 Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlems-
 avgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
 Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
 tel. 08-34 08 00

E-post: sef@esperanto.se
 Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
 dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2001:
 Direktansluten medlem 200 kr.
 Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar un-
 der 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Espe-
 rantisters Ungdomsförbund.
 Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*.
 Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.
 Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Agneta Emanuelsson

Manus till La Espero
 sänds till Leif Nordenstorm
 Järnvägsgränd 11
 961 76 Boden
 tel. 0921-123 54
 e-post: nordenstorm@hem.utfors.se

Väinö kaj Gunhild Ranestål



Väinö Ranestål en junio festis sian 90an naskiĝtagon. En aŭgusto, kiam mi vizitis la jaran NOLIA-foiron en Pitteå, mi vizitis Väinö-n kaj lian edzinon Gunhild, kun kiuj mi konatiĝis dum la 1970-aj jaroj kiam ni loĝis en Kiruna, kie ni estis membroj de Esperanto-klubo Montlagopo.

Leif: Kiel vi lernis Esperanton?

Gunhild: "Kiam mi havis ĉirkaŭ 16-17 jaroj en Kiruna stokisto "Lång-Ölle" (Alta Ulĉjo) estis fervora Esperantisto. Li ege volis ke ankaŭ lia edzino lernu Esperanton, sed ŝi ne kuraĝis partopreni kurson sen amikino. Tial ŝi persvadis min veni. Mi tuj interesiĝis kaj baldaŭ fariĝis sekretario en la E-klubo. Tiatempe, dum la 1930-aj jaroj, estis granda senlaboreco. Multaj senlaboruloj lernis E-on por eviti nenionfaradi."

Väinö: "Mi partoprenis kurson en Kiruna, kiun gvidis estona ĵurnalisti-
 no. En la urbo estis multaj ministoj, kiuj lernis E-on. Estis preskaŭ miraklo. Multaj el ili parolis la svedan malbone, ĉar ilia gepatra lingvo estis Tornevala finna, aŭ simple ĉar ili estis needukitaj, sed E-on ili lernis bone, kaj tiel ekhavis kontaktojn en la tuta mondo."

Leif: "Ĉu vi eble renkontis unu la alian en la Esperantoklubo Montlagopo?"

Väinö: "Fakte ne. Ni ambaŭ estis membroj ankaŭ en la korpokultura klubo, kie ne renkontiĝis. Tiatempe diversaj kluboj en Kiruna estis tre viglaj. Mi estis membro en la korpokultura, esperanta, bontemplana kaj socialdemokrata jululara kluboj. La lastan mi tamen lasis post kelkaj jaroj, ĉar mi ne satis la ateisman etoson tie. En ĉiu klubo estis ĝis ducent membroj, plejparte gejunuloj. La kluba vivo niatempe tute ne estas same vigla.

Leif: "Ĉu vi volas rakonti iajn aparte memorindajn okazaĵojn el la historio de la Esperantoklubo Montlagopo-Kiruna?"

Gunhild: "Oni povas diri ke la homoj desube estis membroj de la klubo. La plejmulto estis laboristoj kaj ankaŭ estis kelkaj oficistoj. Tiu, kiu jam lernis aliajn fremdajn lingvojn ofte ne interesiĝis pri Esperanto. Kelkaj laboristoj fiere povis montri al aliaj homoj grandegajn kolektojn de poŝtkartoj, kiujn ili ricevis de eksterlandaj esperantistoj. Tio faris grandan impreson. Mi memoras ankaŭ ke dum la dua mondmilito ni virinoj faris preskaŭ ĉion en la klubo, ĉar ĉiuj viroj estis konskripciitaj.

Grandega okazaĵo estis la postkongreso en Kiruna post la Universala Kongreso en Stokholmo en 1934. Kolektiĝis anoj de 35 nacioj en Kiruna, unika okazaĵo en la urbeto."

Leif: "Ĉu vi ankaŭ nun uzas Esperanton?"

Väinö: "Ni ambaŭ legas *La Esperon*. Nun ni havas multon por fari pri nia somerdomo, sed kiam ni ne plu okupiĝos pri ĝi ni planas pli multe paroli Esperanton hejme. Tamen ni havas multajn farendadojn. Mi ĵus komencis verki libron pri mia hejmvilaĝo Tuolluvaara, ĉar ne ekzistas tia libro."

Gunhild: "Mi verkis ĉapitron en la libro 'Kiruna, 100 år'. La libro aperis en 2000 kaj mia ĉapitro traktas E-on kaj la internaciajn kontaktojn de la Esperantistoj en Kiruna."

Leif: "Ĉu vi volas rakonti ion pri vi mem?"

Gunhild: "Mi laboris kiel studgvidanto ĉe SKS kaj Väinö laboris kiel socialdirektoro. Ni havas plenkreskintajn infanojn kaj genepojn. Mi verkis libron 'Folket i tiden och Kiruna kyrka', kiu temas pri la historio de la eklezio en Kiruna, do ĉefe pri la kristanaro, nur duavice pri la preĝejoj."

Leif: "Dankon pro la intervjuo."

Intervjuis: Leif Nordenstorm

Fortaleza: bona kongreso



Fortaleza, nekonata urbo en la granda lando Brazilo. Rio de Janeiro estas konata por homoj ekster Sud-Ameriko, sed Fortaleza kun du milionoj da enloĝantoj, ne vekas rememoron.

Nun post la kongreso mi kun agrabla sento rememoras la urbon, la multajn brazilajn esperantistojn kaj la kongreson. Mi diras multajn, ĉar venis 845 brazilanoj al la kongreso, kompare kun 639 el aliaj landoj. Venis 14 svedoj. 211 havis adreson Fortaleza.

SEF kaj UEA kontaktis la svedan ambasadoron en Brasilia kun peto pri reprezentanto, precipe pro la venontjara kongreso en Göteborg.

Venis respondo, sed nea. Ni ankaŭ turnis nin al la svedia konsulo en Fortaleza, kvankam li estas brazilano. Ni longe atendis respondon, kaj mi nur ricevis informon pri jesa respondo post mia alveno al Fortaleza.

La inaŭguro

Christer Lörnemark, ne feste vestita – lia valizo ne atingis lin – akceptis sidi sur la podio inter la aliaj reprezentantoj de Landaj Asocioj. Mi mem, kun kravato, surpronis la taskon bonvenigi la konsulon, kiu venis kun sia brita edzino.

La eminentaj gastoj kolektiĝis kaj plenigis la malgrandan salonon PRIVAT (pro Edmond Privat). En iu momento mi hazarde vidis ke Humphrey Tonkin kaj Jane Edwards staris dorse al mi, kaj mi kaptis la okazon prezenti la edzinon de la konsulo al ili. Tio poste kaŭzis ke Jane Edwards proponis sin kiel tradukhelpo al la konsuledzino.

Surpodie sidis la UEA-estraro, mankis tamen la plej nova estrarano Grigorijevski el Rusio. La plej eminenta el la gastoj estis la ministro (generalo) Alfredo Cardoso. Li venis por prezenti la brazilan prezidenton. Li legis

sian paroladon en esperanto, tute perfekte.

La guberniestro kaj nun Alta Prorektanto, Beni Veras, legis sian paroladon en la portugala. La tradukon faris la konata esperantistino Ursula Grattapaglia. Ŝi kaj la edzo Giuseppe fondis antaŭ multaj jaroj la specialan lernejon Bona Espero ie en la brazila kamparo.

Patrick Gallaud, reprezentanto de UNESCO en Parizo, legis sian mesaĝon en la franca. Gallaud partoprenis poste en la kongreso dum la tuta semajno. Li eĉ partoprenis en Ĉe-kurso*. Pro tio li en la ferma ĉe-ceremonio sep tagojn poste, fiere legis sian paroladon en klara esperanto.

La UEA-prezidanto Renato Corsetti faris interesan kaj iom humuran prelegon. Neante ke li faras festparolon li uzis ripetite la enkondukan frazon: "Se mi festparolus, mi eble dirus..."

Alia vere interesa prelego sekvis de Carlos Morales. Li estas prezidanto de Monda Ligo de Indiĝenaj Popoloj. Li loĝas en Kostariko kaj li prelegis pri la projekto "Indiĝenaj Dialogoj". Okazis ankaŭ en alia tago speciala programero pri tiu temo.

Inter prelegoj venis bona kantisto kiu kantis kanton *Akvarelo de Brazil'*, tre konata melodio. Poste oni projekciis la tekston sur granda ekrano kaj la publiko ricevis ŝancon kune kanti. Tiam mi vidis ke la konsula paro partoprenis en la kantado.

Sekvis aliaj prelegoj laŭ inaŭgura rutino, kaj ĉio finiĝis kiel kutime per salutanta parado de reprezentantoj el landoj kun Landaj Asocioj. Tiu parto vekis grandan intereson inter la invititaj gastoj.

Mi ne povas preteriri la salutanton el Koreio, kiu aperis ĉe la mikrofono en ruĝa T-ĉemizo, kian la koreaj futbalentuziasmoj surhavis dum matĉoj kiam la Mondĉampiona Futbalkonkurso okazis en junio. Surkape li havis ruĝan tukon. Lia saluto direktis sin al la "futbala nacio Brazilo", kaj li kriis kun levitaj manoj kiel oni faras en matĉo. Tian ŝercan saluton oni ne spertis antaŭe.

Lörnemark faris sian saluton por Svedio kaj kompreneble admonis la homojn veni al Göteborg 2003.

Brazilia dancarto kaj muziko

estas grandioza. Tion ni povis konstati en la Nacia Vespero kaj en alia vespera programo. Ne eblas per vortoj priskribi la koreografion de la dancprezentoj, ĉar ofte estis miksaĵo de individuaj movoj, tamen en harmonio

kun la ritma muziko.

Unu el la dancprezentoj estis vere karnavaleca kun moviĝantaj personecoj, tute malsame vestitaj kaj ekipitaj en belaj kostumoj kolore imponaj.

Budo por Göteborg

Pro ofta deĵorado en la "budo" por nia reklamado por Göteborg, mi perdis plurajn interesajn prelegojn, sed mi ricevis okazon babili kun multaj diversaj personoj pri Göteborg. Kelkaj brazilanoj venis por diri ke ili scias pri la sveda reĝino Silvia.

Alia brazilano venis kaj rakontis ke li vizitis la kongreson en Stockholm 1980, kaj li aldonis ke estis li kiu transprenis la esperantan flagon de sveda LKK por porti ĝin al Brasilia. Tiam mi povis informi lin ke estis mi kiu transdonis la flagon al li!

La loka kongresa komitato havis multajn helpantojn, kaj ili jubile montris en la ferma ceremonio ke la prezidanto de LKK, Ribeiro Wandemberg, estis ege populara persono. La kunlaboro inter li kaj la helpantoj verŝajne funkciis tre bone.

Lörnemark kaj mi je la fino iris sur la podion por simbole transpreni la taskon aranĝi la venontan universalan kongreson. La transprenita flago nuntempe estas malgranda kaj malpeza.

Varme, sed ne terure varme

Preskaŭ ĉiuj eksterlandaj partoprenantoj ricevis hotelĉambrojn en hoteloj apud la marbordo. Estis nur 70 metroj al varma mara akvo, sed mi ne vidis kongresanojn viziti la strandon, nek mi mem.


100 personoj estis invititaj de la guberniestro al akcepto en iu vespero en interesa domo.

30 personoj estis en alia vespero invititaj al 85-jara virino, kiu kun sia familio akceptis nin en iu granda bieno iom ekster la urbo. Montriĝis ke la virino iam iom lernis esperanton kiam ŝia patro estis aktiva esperantisto. Kiam ŝi eksciis pri la kongreso, ŝi donacis monon por la kongreso. Ŝi ankaŭ volis renkonti esperantistojn el diversaj landoj, kaj pro tio ŝi invitis nin por babilado kaj ni ricevis trinkaĵojn kaj ion por manĝi en agrabla vespero.

Roland Lindblom

* Ĉe-kurso: kurso laŭ la ĉe-pedagogio, inventita de la esperantisto Andreo Cseh (1895-). (ndlr)

Akademio respondas: Christer Kiselman kaj Geraldo Mattos. Ĉiuj fotoj pri UK: Roland Lindblom.



Fortaleza: kelkaj memoroj de vojaĝo



El la hotela fenestro. Preskaŭ ĉiuj kongresanoj el eksterlando loĝis en diversaj hoteloj laŭ la bela bordo.

Fortaleza troviĝas tri gradojn sub la ekvatoro, en la brazila partŝtato Ceará ĉe la nordorienta marbordo. Ceará havas 9 milionojn da loĝantoj, estas teritorie trioble pli granda ol Danio, kaj estas malgranda partŝtato en Brazilo.

La urbo havas 2,2 milionojn da loĝantoj kaj etendiĝas tre vaste. Granda parto de la urba vivo okazas laŭ la plaĝo kaj la avenuo Beia Mar, strato kiu estas ĉ. 5 kilometrojn longa. Preskaŭ ĉiuj konstruaĵoj en la urbo ŝajnas datiĝi de la plej lastaj 50 jaroj. Estas preskaŭ senfina krado de stratoj, en maniero simila al usonaj urbejoj. Ankaŭ la ĝenerala stratobildo pensigas pri (suda) Usono (krom tio ke anglaj tekstoj estas sufiĉe maloftaj en ŝildoj k.a. — multe pli maloftaj ol en Svedio). Sed ie kaj tie, miksite kun la moderna aspekto, oni trovas slumajojn. En Fortaleza oni vikle konstruadas altajn apartamentajn domegojn, kaj ili ne estas por malriĉuloj. Ĉe la bazoj de tiuj turoj oni trovas domegojn, iuj slumaj, aliaj ordinaraĵoj. Brazilo havas la monde plej malegala distribuon de havaĵoj. Kelkfoje mi vidis stratajn infanojn peti almozojn antaŭ la luksaj hoteloj ĉe Avenida Beia Mar.

La temperaturo tage estas pli ol 30 centigradoj, vespere-nokte 23-29 centigradoj. Nu, al tiuj termometraj ciferoj oni aldonu la aeran humidecon. Aŭgusto estas vintro en Fortaleza kaj pro tio komenciĝis mallumiĝi jam je la 5-a posttagmeze; je la 6-a estis jam mallume. La sunleviĝo okazis je la 5-a matene. En la Kongresa Libro estis averto pri la suno: oni uzu sunkremon kun kiel eble plej alta protekta faktoro por ke la haŭto ne iĝu "bruligita". Mi aĉetis kremon kun la faktoro 50. Uzi ĉapelon tute malaĉas, ĉar la suno estis ofte en zenito.

Transporte

Por la kongresanoj troviĝis speciala busoservo: plurfoje tage dum la kongreso buso(j) iris inter la kongresaj hoteloj kaj la kongresejo. La bileto por tio kostis 120 realojn, t.e. ĉ. 396 kronojn. (Estis pli malmultekoste veturi taksie matene al la kongresejo kaj veturi per ordinara buso vespere.)

Ja temis pri enorma urbo kaj tropika varmo, do piedirado estis nur por sufiĉe mallongaj distancoj. Plej facile oni transportas sin per taksio. La veturo kostas apenaŭ kvaronon de sveda taksivojaĝo, kaj ekster ĉiu granda hotelo la taksioj svarmas.

Veturi per la urbaj busoj de Fortaleza estas... neforgesebla sperto. Unue, ĉiuj aŭtoj kaj busoj veturas rapide, abrupte kaj kun tre mallongaj distancoj inter la veturiloj. Tio ne estas trafiko por timuloj. Due, la busoj ofte malhavas dampilojn kaj la stratoj estas foje neebenaj. En certaj busoj mi estis tiel skuata pro la veturado ke ne eblis legi mapon, krom kiam la buso haltis pro ruĝa lumo. (Jes, plejofte ili respektis tiun "rekomendon".) Trie, ĉe la bushaltejoj ne estas skribite kiuj buslinioj trafikis ĝuste tiun haltejon. Horaroj eble ekzistas, tamen ili ne troveblas ĉe la haltejo. Kvare, la busoj ne haltas ĉe la haltejoj, se oni ne mansvingas energie. Do, la buso alproksimiĝas tre rapide, ofte nur prilumite de stratolampoj, kaj oni devas decidiĝi tre rapide (ĉu estas la ĝusta buso aŭ ne). Se la ŝoforo vidis la mansvingon li forte piedpremas la bremspedalon kaj la buso haltas iom post la haltejo. Endas kuri al ĝi kaj eniri malantaŭe en la buso. — (En fortelezaj busoj oni eniras malantaŭe kaj eliras antaŭe, male ol en svedaj busoj.) Kvine, la ŝoforoj ne ĉiam observas la trafikregulojn. Unu ŝoforo ne hezitis veturadi ĉe la maldekstra flanko de la strato se estis ruĝa lumo; tiel li povis preteriri tiujn kiuj haltis antaŭ la trafik-

signalo. (Kompreneble estis alvenanta trafiko en tiu parto de la strato, sed ili jetis sin flanken kiam venis la buso.) (La busbileto kostas 1,20 realojn, t.e. ĉ. 3 kronojn.)

Lingve

En la kongreslibro estas skribite, ke la fortelezanoj ne estas fremdlingvemaj. Brazilo estas unu el la aree plej grandaj landoj de la mondo, ĝi same grandas kiel Usono minus Alasko kaj Havajo. El la 170 milionoj da loĝantoj preskaŭ ĉiuj parolas la portugalan, kaj plejofte ili tutsimple ne bezonas fremdlingvojn.

La portugala estas latinida lingvo, parenca al la hispana, itala, franca kaj rumana. Ĝi estas sufiĉe malsama de la hispana. Hispanparolanto kaj portugalarolanto povas interkompreniĝi, sed ne ĉiam facile. Mi studis i.a. la francan kaj la italan, kaj mi povas legi gazeton en la portugala kaj kompreni la plejparton. Sed parolata portugala estas tute alia afero. Foje mi komprenis, sed plejofte la portugala estis kvazaŭ ĉifro.

Por turisto la angla estas plejparte senutila; la hispana multe pli gravas. Eĉ en la flughaveno de Fortaleza estis foje malfacile trovi iun kiu povis paroli la anglan. Mi iris al budo por turismaj informoj tie kaj demandis, ĉu troviĝis horaroj por la urbaj busoj. La deĵoristino ne tute komprenis mian anglalingvan demandon kaj horarojn mi ne ricevis. (Generale la taksistoj tute ne parolas la anglan. El eble 15 ŝoforoj kiujn mi renkontis nur unu povis konversacii, rudimente, en la angla.)

La hotelo en kiu mi loĝis havis kiel parton de sia reklamo: "On parle français. English spoken." Devus esti: "Unu persono en la hotelo parolas la francan kaj komprenas la anglan, sed plejofte ŝi ne estas tie. La aliaj kvar dungitoj parolas nur la portugalan." Sed tiu teksto ne estus same reklama. Mi uzis la francan kun tiu dungitino. Kun la aliaj dungitoj mi uzis portugalaĵajn turistfrazojn kaj erojn de la franca, itala, Esperanto, k.a. Mi baldaŭ trovis, ke estas nebona metodo rekte demandi "Do you speak English?", "Parlez-vous français?", "Parla italiana?" ktp. Multaj brazilanoj ne opinias sin kompreni tiujn lingvojn. Se oni anstataŭe rekte diras ion kion ili povus kompreni, eblis kompreniĝi sin. Sed tion mi provis nur en konkretaj komunikaj situacioj.

Unu tagon mi eniris butikon por Makintoŝ-komputiloj (troviĝis du en

la tuta Fortaleza, ĉar Makintoŝo estas pli neordinara komputilo en Brazilo ol en Svedio). En la butikoj troviĝis du dungitoj – kaj ili ne parolis la anglan. Unu el ili komprenis ĝin iomete, sed vere ne tre multe (pri ilia lega kono de la angla mi ne scias). Sub reklama afiŝo de Apple (“Does more, costs less”) ni provis pene interkompreniĝi. La angla estas ofte prifanfaronata kiel la lingvo de komputiloj, sed tio ne ĉie veras.

(En strato proksime al mia hotelo troviĝis ia lingvokursejo. Laŭ reklamŝildo ekstere ili instruis la anglan laŭ “American and Britanic system” (tiel!). Tio kredeble signifas, ke ili volas instrui kaj usonan kaj britan anglan. (La malĝusta formo “Britannic” troviĝas en la angla nur en frazoj kiel “Her Britannic Majesty”). Kian anglan parolas la lernantoj de tia instituto?)

Unu malfruan vesperon (23.20) mi veturis al mia hotelo per ordinara buso. Ĉe busterminalo ĝi haltis kaj ĉiuj pasaĝeroj eliris. La kondukto klarigis ion portugale al mi, sed li estis nekomprenebla. Tute klare la buso ne pluiris, sed kiun alian buson mi prenu por atingi mian hotelon? Ĉu estis tiel malfrue, ke busoj entute ne ira-

dis plu? La informojn mi ne havis. Mi sciis, ke estis kelkaj esperantistoj en la buso, sed ili estis elirintaj, mi ne konis ilin laŭaspekte kaj ili ne havis iajn Esperanto-rilatajn vestaĵojn. Mi devis eliri la buson, kaj ĝi malaperis. La busterminalo troviĝis izole, en fora urboparto. Ĝin uzis nur brazilanoj kaj taksioj tute ne troviĝis tie. La plej proksima taksio troviĝis kredeble kelkajn kilometrojn for. Kaj piedirado en brazila urbo dum la nokto ne estas saniga, pro la raborisko. Sed baldaŭ mi vidis, ke la aliaj elirintaj pasaĝeroj ŝajnis grupiĝi je certa loko de la terminala kajo. Kaj ĝuste tiam venis buso kun la samaj ŝoforo kaj kondukto, kaj la sama nomo: “Grande circular 1”. Temis pri buslinio kiu rondiris la urbon dum tri horoj kaj iradis plu tiel. Foje ili ja devis ŝanĝi la buson mem, la ŝoforojn kaj konduktojn, kaj pleniĝi la benzinujon. Ĉi tiu estis tiam paŭzo.

Se oni troviĝas en fremda lando kaj ne (tute) komprenas la tiean lingvon, kaj ili ne komprenas la via(j)n lingvo(j)n, gravas ke oni komprenu kiel fari en konkretaj situacioj: kiel oni staras en vicoj, kiel oni veturas per buso, k.m.a. Bedaŭrinde oni bezonas lingvon ĝuste por tiuj situacioj en kiuj ne estas memklare kiel oni faru.

Konklude: multaj svedoj ankoraŭ kredas, ke la angla estas parolata ĉie. Tiuj kredantoj povus multe profiti de studvojaĝo en Brazilo – se ili farus ĝin sen portugallingva interpretisto.

Valize kaj mone

Mia valizo ne troviĝis en la flughaveno de Fortaleza, kaj nur post kvin tagoj mi ricevis ĝin. Pro tio mi devis aĉeti novajn vestaĵojn. Mi sidis kelkfoje en la flughaveno, atendante kaj plenumante plendblanketon, kaj dume la valizo turstis en Brazilo. Oni retrovis ĝin en Sao-Paolo. (Por eŭropano tio estas kvazaŭ oni flugus al Kiruna kaj la valizo troviĝus en Napolo.)

La brazila monunuo, la realo, valoris 3,30 svedajn kronojn meze de julio kaj 2,65 SEK kiam mi venis hejmen. Por svedo la brazilaj prezoj estas ĝenerale tre malaltaj.

Christer Lörnemark

Duan fojon en Sudameriko

(kaj trian fojon en Latinameriko – la du konceptoj ne estas sinonimaj)

Okazis ĉijare la UK – en Fortaleza, Ceará, Brazilo. Ĉar mi ĉeestis ankaŭ la antaŭan brazilan UK-n, en 1981 en la ĉefurbo en la tiama kongresa libro nomita Brazilio – formo ne plu uzata – mi ne povas ne kompari ilin, aŭ ne rimarki ke Brazilo ne estas homogeno lando, space kaj/aŭ tempe. En 1981, dum kongreso kie ĉiuj oficialaj kunvenoj (almenaŭ ŝajnis esti ĉiuj) okazis en alia salono kaj/aŭ je alia horo ol la indikita, la esperanta vortaro riĉiĝis per la esprimo “bonvolu malforstrecki” – laŭ mia scio plurajn jarojn antaŭ ol populariĝis la angla sinonimo “undelete”: esperantistoj vere estas pioniroj!

Sed kio okazis antaŭ du jardekoj en urbo “perfekte planita” (kaj inspirita la arkitektoj de la sveda “millionprogramo” kaj aliajn) feliĉe ne ripetigis ĉijare, en urbo kiu ne originis en oficejo. Nun ne estis problemoj trovi kunvenon en la ĝusta salono je la ĝusta horo (kaj preskaŭ minuto, kvankam kompreneble kelkaj grupoj emis resti iom longe; sed tio estas problemoj interkontinenta).

Entute pli homa urbo ol la ĉefa, almenaŭ kiel tiu aspektis en 1981. Miksaĵo de nubsrapuloj kaj kvartaloj malriĉaj, el kiuj oni povas tuj transporti sin en futurisman medion, simple enirante interretkafejon.

Mi povas noti ankaŭ ke Ameriko ne estas mondparto homogena. Du ecoj kutimaj en ekzemple Usono ŝajnas nekonataj en Brazilo, aŭ almenaŭ en Fortaleza: rasa segregacio kaj puritanismo.

Kaj en la urba biblioteko, reinaŭgurita antaŭ nur kelkaj monatoj, videblas sur la muro citaĵo de Mário Quintana, pensiga ankaŭ al esperantistoj:

“La veraj analfabetoj estas tiuj kiuj lernis legi kaj ne legas.”

Gunnar Gällmo

La koreo “Johano” montras al la enirejo. La sveda telefonlibrokompanio cetere havas la nomon “Eniro”, kiu devenas de la esperanta vorto “eniro”.



Komitato de UEA

Universala Esperanto-Asocio (grundad 1908) har 21 317 medlemmar i 117 länder (2001 års siffror). UEA har individuella medlemmar (6428 st.), men också nationella förbund (63 st.) som medlemsorganisationer; Svenska Esperanto-Förbundet är en av dessa. UEA:s styrelse och andra funktionärer väljs av UEA:s beslutande församling, *Komitato de UEA*. Komitato (representantskapet) består av A-komitatanj, som är representanter för de nationella förbunden (en representant för varje påbörjat tusental medlemmar), B-komitatanj, som representerar de individuella medlemmarna, samt C-komitatanj. C-gruppen är adjungerade ledamöter, som väljs av A- och B-komitatanj. Representantskapsledamöterna väljs på tre år. I Fortaleza var 41 representantskapsledamöter närvarande.

Komitato sammanträder under varje Universala Kongreso och viss verksamhet sker också per post, och numera e-post, under resten av året. Nytt för denna kongress var underkommittéerna, de s.k. subkomitatanj, som var och en behandlar ett specialområde (de började fungera hösten 2001). Varje representantskaps-

ledamot ingår i en eller flera underkommittéer och det hör en e-postlista till varje underkommitté. Med arbetet på nätet blir det mera kontinuerlig verksamhet i Komitato under ett år, verksamheten koncentreras inte så mycket till själva UK. Det medför också att sammanträdestiden under UK blir kortare: Under tidigare kongresser sammanträdde *Komitato* i plenum under 14 timmar, fördelat på tre dagar under UK. I år sammanträdde man i plenum under knappt åtta timmar, medan varje underkommitté hade var sitt möte om ca 1 1/2 timme. Mötena var fördelade under veckan så att den representantskapsledamot som så önskade kunde delta i flera underkommittéer.

Underkommittéernas möten bestod av diskussioner, som även vanliga kongressdeltagare kunde delta i. Slutsatserna från varje underkommitté förelades plenum under sista sammanträdet; först i plenum fattas de formella besluten.

Styrelsens verksamhetsberättelse fick kraftig kritik i år. Det påpekades att det t.ex. fattades ett avsnitt om kultur (ett sådant delades ut under mötet) och att det fanns sakfel i tex-

ten. Delar av texten handlade om våren 2002, inte om år 2001. Styrelsen lovade att en ny version av årsberättelsen kommer att publiceras i ett kommande nummer av tidskriften *Esperanto*. Då blev verksamhetsberättelsen godkänd, med 38 röster för och 3 nedlagda röster. Den ekonomiska berättelsen blev däremot godkänd utan anmärkningar och styrelsen beviljades ansvarsfrihet enligt revisorernas förslag.

Bland de många frågor som behandlades kan nämnas:

Man diskuterade finansieringen av det s.k. Komunikadcentro i Bryssel, ett "kontor" för pressbevakning och presskommunikéer. Någon kontorslokal har man ännu inte, däremot en heltidsanställd informatör, David Ferguson, som utträttat mycket på ett drygt halvår. UEA garanterar hans lön i två år, därefter är finansieringen oviss. Besluts att UEA skulle se över hur Komunikadcentro kan finansieras i fortsättningen, eftersom esperanto-rörelsen har mycket stor nytta av det.

Man valde en valberedning bestående av tre ledamöter.

Christer Lörmemark



La UEA-estraro en kunsido kun la komitato. La bela tabulo bone ornamis la lokalon. UEA:s styrelse i sammanträde med representantskapet. Den vackra skylten smyckade ut lokalen väl.

”Si en simplaj frazoj” — specimeno el PMEG

Ĉu vi konas PMEG? La mallongigo signifas ”Plena manlibro de Esperanta gramatiko”. Ĝi estas verkita de Bertil Wennergren. PMEG ne publikigis libroforme, sed estas legebla interrete ĉe www.bertilow.com

En tiu ĉi numero La Espero prezentas specimeno el PMEG. Tio estas la ĉapitro pri ”Si en simplaj frazoj”. Vi povos mem plulegi en PMEG en interreto.

Ofte okazas, ke tio, kio rolas kiel subjekto, aperas ankaŭ en alia rolo en la sama frazo. Se la subjekto estas *mi*, *ni* aŭ *vi* (aŭ *ci*), oni simple ripetas la saman pronomon.

Mi lavas min. La du *mi* estas la sama persono.

Mi vidas mian fraton. *Mi* kaj *mia* montras la saman personon.

Ni lavas nin. La du *ni* estas la samaj personoj.

Ni vidas niajn fratinojn. *Ni* kaj *nia* montras la samajn personojn.

Vi lavas vin. La du *vi* estas la sama(j) persono(j).

Vi vidas viajn fratinojn. *Vi* kaj *via* montras la sama(j)n persono(j)n.

Sed se la subjekto estas triapersona (nek la parolanto, nek la alparolanto), oni devas uzi *si* por la alia rolo. Se oni uzas ekz. *li* kaj subjekte, kaj en alia rolo, tiam temas nepre pri du malsamaj viroj. La samo validas por *ŝi*, *ĝi* kaj *ili*.

Ŝi lavas ŝin. Unu virino lavas alian virinon.

Ŝi lavas sin. Unu virino lavas la propran korpon. *Ŝi* kaj *sin* montras la saman personon.

Ŝi vidas ŝian patrinon. Unu virino vidas la patrinon de alia virino.

Ŝi vidas sian patrinon. Unu virino vidas la propran patrinon.

Li lavas lin. Unu viro lavas alian virinon.

Li lavas sin. Unu viro lavas la propran korpon. *Li* kaj *sin* montras la saman personon.

Li vidas lian patrinon. Unu viro vidas la patrinon de alia viro.

Li vidas sian patrinon. Unu viro vidas la propran patrinon.

Ĝi lavas ĝin. Unu besto lavas alian beston (aŭ aĵon).

Ĝi lavas sin. Unu besto lavas la propran korpon. *Ĝi* kaj *sin* montras la saman beston.

Ĝi vidas ĝian patrinon. Unu besto vidas la patrinon de alia besto.

Ĝi vidas sian patrinon. Unu besto vidas la propran patrinon.

Ili lavas ilin. Unu grupo de personoj aŭ bestoj lavas alian grupon.

Ili lavas sin. Unu grupo lavas la proprajn korpojn. *Ili* kaj *sin* montras la saman grupon.

Ili vidas ilian patrinon. Unu grupo vidas la patrinon de alia grupo.

Ili vidas sian patrinon. Unu grupo vidas la propran patrinon.

Karlo lavas lin. Karlo lavas alian virinon.

Karlo lavas sin. Karlo lavas la propran korpon.

Karlo lavas lian infanon. La infano apartenas al alia viro ol Karlo.

Karlo lavas sian infanon. La infano apartenas al Karlo.

Oni ne forgesas facile sian unuan amon. (FE.18)*

Ŝi kombas al si la harojn per argenta kombilo. (FE.34)

La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej proksima arbaro. (FE.21)

Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj. (FE.34)

En tiuj ĉi boteletoj sin trovas diversaj acidoj. (FE.35)

Sur la arbo sin trovis multe da birdoj. (FE.32) Subjekto estas multe da birdoj. Pri E-vortoj en O-vorteca rolo vidu ”Kvantaj E-vortoj”.

Ŝi nomis ŝin sia filino. (FE.17)

Niaj fratinoj eliris kun la gastoj el sia domo (la domo de niaj fratinoj) kaj *akompanis ilin ĝis ilia domo* (la domo de la gastoj). (FE.18)

Ŝi edziniĝis kun sia kuzo. (FE.39)

Ŝi rakontis al li sian tutan aventuron. (FE.23) La aventuro estis de la virino.

Ŝteliston neniu lasas en sian domon. (FE.37)

Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon. (FE.38)

El ĉiuj **siaj** fratinoj **Antono** estas la malplej saĝa. (FE.10)

Tiu kaj ties foje estas uzataj por reprezenti ion, kio antaŭe aperis en nesubjekta rolo. Ili tiam estas kvazaŭ la malloj de *si* kaj *sia*. Vidu pri tio ”Tabelvortoj je U” kaj ”Tabelvortoj je ES”.

Si ne povas esti subjekto

Si neniam povas esti mem subjekto, nek parto de subjekto, ĉar tiam *si* reprezentus sin mem. Same *sia* ne povas esti parto de subjekto. Ne eblas frazoj kiel: **Si manĝas*. **Mi kaj si dan-*

cas. **Petro kaj si fiŝas*. **Mia kaj sia fratoj estas samklasanoj*. **Sia edzino estis kisata de li*. * Ne diru do: **Karlo kaj sia frato promenas en la parko*. * Se oni dirus tian frazon, oni verŝajne intencus, ke *sia* reprezentu Karlon, sed la subjekto ja ne estas Karlo, sed **Karlo kaj sia frato*. Diru: *Karlo kaj lia frato promenas en la parko*.

Tamen oni povas uzi *si*, se oni ŝanĝas la frazon jene: *Karlo kun sia frato promenas en la parko*. Nun la subjekto estas *Karlo*, kaj *sia* ĝuste reprezentas Karlon. La frazparto *kun sia frato* ne estas parto de la subjekto, sed kun-komplemento.

Si estas ĉiam triapersona

Si ne povas reprezenti la unuan aŭ duan personojn: *mi*, *ni* aŭ *vi* (aŭ *ci*). Ne diru: **Mi venis kun sia frato*. * Diru: *Mi venis kun mia frato*.

Sed kiam oni uzas *sin* prefiksece en kunmetitaj vortoj, tiam ĝi perdas *sian* ligan al la tria persono: *sindefendo*, *sinmortigo* k.s. Vidu ”Aliaj afiksecaj vortetoj”.

Si en pasiva frazo

Si kaj *sia* reprezentas la gramatikan subjekton. Tio validas ankaŭ en pasivaj frazoj, kvankam la gramatika subjekto ne estas aganto en tiaj frazoj. Ĝi estas amata por **si**, ne por la doto. Ĝi estas amata de **siaj** instruistinoj. *Karlo estis akompanata de Petro al sia domo*. = ...al la domo de Karlo. *Karlo estis akompanata de Petro al lia domo*. = ...al la domo de Petro.

Bertil Wennergren

* FE estas indiko, el kiu verko la citaĵo venis. La redaktoro de La Espero divenas ke FE signifas ”Fundamento de Esperanto”.

KORESPONDI
DEZIRAS

16-jara lernantino kiu lernas esperanton kaj tre bezonas korespondamikon. Koresponado helpus al plua lernado de esperanto. Ĝi estas kiel plejparto de junulinoj — ŝatas aŭkulti leĝeran muzikon, legi, babili kun la amikinoj k.t.p.: F-ino Reena Vaikla
La adreso estas: Papli 16 — 1, EE-80012 Pärnu, Estonio.

La unua Balta Esperanto-Forumo

La unua Balta Esperanto-Forumo okazis 14-18 aŭgusto 2002 en Kaliningrad — la ĉefa urbo de la plej okcidenta regiono de Ruslando. Ĉi tiu forumo estis, verŝajne, la plej internacia el ĉiuj aranĝoj, kiujn organizis ruslandaj esperantistoj. Inter la 123 aliĝintoj (el ili 113 reale partoprenis) el 12 landoj, estis nur dudeko da ruslandanoj.

La forumanoj konatiĝis kun la historio, nuntempo kaj estonteco de Kaliningrad/Königsberg kaj ties regiono, inter alie, per prelego de Wolfgang Kirschstein. Aliaj prelegoj estis dediĉitaj al Vladimir Varankin kaj ties "Metropoliteno" (Aleksander Korĵenkov), "Eŭgeno Onegin" de Puŝkin (Valentin Melnikov prezentis fragmentojn el sia traduko), korupto en Pollando (Maciej Wnuk), ekologio de la Balta Maro (Ingvar Enghart), rilatoj inter Ruslando kaj Ĉeĥio (Zdenek Polák). Diverslandaj partoprenantoj faris raportojn, proponojn kaj demandojn en la seminario "Esperanto en Baltio".

Kadre de BEF-1 okazis seminario pri literatura kritiko, kiun preparis Wolfgang Kirschstein. Li kaj aliaj redaktantoj de "La Ondo de Esperanto" respondis demandojn de legantoj. Pluraj forumanoj profitis la unuatagan oferton de eldonejo "Sezonoj", kiu lanĉis la unuan volumon de la kvinvoluma verkaro de Fjodor Dostojevskij en Esperanto. La unua volumo, "Blankaj noktoj", enhavas ses verkojn de Dostojevskij en novaj tradukoj. Du el la tri tradukintoj (Aleksiej Birjuljin kaj Aleksander Korĵenkov) subskribis la unuajn venditajn ekzemplerojn.

Oni havis ŝancon konatiĝi kun personoj, kies nomojn oni konas, sed kiuj malofte vidiĝas en la Movado: Maciej Wnuk, Wolfgang Kirschstein, Stasys Kruzinauskas, Aleksiej Birjuljin kaj eĉ Alen Kris — tiu mistera poeto (kelkaj kredis ke ĝi estas plumnomo de aliaj esperantistoj) en BEF unuafoje partoprenis esperantistan kunvenon.

La streĉan laborprogramon agrable variigis interkona vespero, koncerto de studio "Lira" kaj kviza vespero de Marian Zdanowski. La celo de la duontaga ekskurso estis ĉarma banurbo Svetlogorsk (Rauschen).

La Forumo altiris atenton de amaskomunikiloj, kiuj sendis siajn reprezentantojn al la malfermo en la Urbodomo, en kiu la forumanojn alparolis, inter alie, Ĝenerala Konsulo

de Pollando, Jaroslaw Czubinski. En la aperintaj gazetoj, radiaj kaj televida raportoj estis akcentita la rolo, kiun povas havi esperantistoj, kiel internacia neregistara movado, en la kontaktoj inter Ruslando kaj Eŭropa Unio.

Pluraj partoprenintoj pledis por okazigo de la dua BEF en la sama urbo post unu jaro.

Halina Gorecka

Indiĝenaj dialogoj

Indiĝenaj Popoloj estas la kuratoroj de netrotakseblaj naturaj kaj kulturaj valoroj. Ili estas ankaŭ la portantoj de esencaj saĝo kaj scio. Kaj tamen tre malmultaj registaroj konsideras ilin egalrangaj partneroj, aŭ eĉ nur respektas iliajn elektojn aŭ apogas iliajn aspirojn.

La daŭranta ruinigo de iliaj vivmedioj, iliaj lingvoj kaj iliaj mondoj, domaĝas al ni ĉiuj. La Jardeko por la Indiĝenaj Popoloj, proklamita de UN (1995-2004) ŝajnas ne bremsi tiun negativan evoluon.

Malgraŭ tio, la Organizoj de Indiĝenaj Popoloj atingis rimarkindajn rezultojn dum la pasintaj jaroj! Indiĝenaj Popoloj devis ĉiam batali por siaj rajtoj. Ĉie en la mondo, ili staras antaŭ similaj viv-minacaj defioj. Multaj Organizoj de Indiĝenaj Popoloj nun kunlaboras por teksti tutmondan reton, por inversigi la tajdon de detruo.

Ili konscias, ke pli intensa interŝanĝo de informoj, scioj kaj spertoj grave akcelus la disvastigon de kreamaj kaj efikaj alternativoj kaj tiel grave utilis al ili ĉiuj. Tamen, libera komunikado inter Indiĝenaj Popoloj estas ankoraŭ limigita.

La manko de unu komuna lingvo kaj limigita aliro al moderna komunikado ludas decidan rolon en tio.

La indiĝenaj popoloj dependas, por siaj interkulturaj kontaktoj, grandparte je tradukistoj kaj interpretistoj, kio kaŭzas konsiderindan perdon de tempo, mono kaj nuancoj. La uzo de ponto-lingvoj (ekzemple la Angla, Hispana, Franca, aŭ Rusa...) ne prezentas kontentigan alternativon je monda nivelo. Kiel la aferoj statas nun, reprezentantoj de Indiĝenaj Popoloj ofte komunikas nur kun tiuj kiuj kapablas paroli la saman ponto-lingvon.

Do, kiel ŝanĝi tion?

La projekto ID ('Indiĝenaj dialogoj') celas fortigi la Organizojn de Indiĝenaj Popoloj, disponigante al ili la rimedojn por plena kaj rekta komunikado inter ili.

La kombino de Esperanto kaj modernaj komunikadaj sistemoj malfermos vojon por optimuma uzo kaj solida vastigo de internaciaj indiĝenaj retoj. Por atingi altkvalitan komunikadon je malaltaj kostoj, la kontaktpersonoj de Organizoj de Indiĝenaj Popoloj devus lerni:

- * paroli kaj skribi Esperanton flue,
- * uzi fakson kaj retpoŝton efike,
- * enkonduki la uzon de tiuj kapabloj interne de siaj Organizoj.

Por ebligi tion, la projekto ID ofertas tri-semajnajn kursojn kun utiligo de la plej bonaj instrumentadoj. ID esperas trejni 250 delegitojn antaŭ la jaro 2005. La unua kurso por 20 partoprenantoj okazis en Nederlando de la 29a de aŭgusto ĝis la 19a de septembro 1999.

La kompleta vizio:

en 2005, la indiĝenaj popoloj povus:

- * esti formintaj solidan kaj vastiĝantan reton de proksimume 200 organizoj, sen komunikadaj limoj, kaj esti tiel rompintaj la lingvajn barojn inter si.
- * esti lernintaj unu de la alia, pere de (virtuala) Indiĝena Interkultura Universitato kiel, ekzemple, savi lingvon, observigi traktaton, protekti sian intelektaĵon, proprieton kaj sian naturan vivmedion.
- * esti kreintaj Unuiĝintajn Indiĝenajn Naciojn, kiu akceptigus kaj observigus la Rajtojn de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo.

Kiu partoprenis en la unua kurso? La sekvantaj popoloj estis reprezentataj: Tlingita (Alasko), Ŝora (Siberio); Mapuĉea (Ĉilio), Brunkaa (Kostariko), Masaja (Kenjo), Dajaka (Malajzio), Lumbia (Usono), Papua (Novgvineo), Majaa (Gvatemalo) kaj aliaj...

Kial do elekti Esperanton (kaj ne la Anglan) kiel ponto-lingvon por ĉi tiu projekto? Oni povas lerni por ĉi tiu Esperanton multe pli rapide kaj bone ol la Anglan kaj ID celas rapide estiĝi veran komunikadon inter la membroj de la reto. La neŭtraleco de Esperanto ebligas kontakton je bazo de egaleco kaj respektas la indiĝenajn lingvojn; elekto de la Angla malavantaĝigus multajn ne-okcidentajn popolojn. Esperanto, dank' al ĝia sistemo de vortformado, estas pli taŭga por esprimi konceptojn ligitajn al certa kulturo, kaj novajn estiĝantajn per in-

DONACOJ

ROLDO LANGLET
Ĉiumonataj dona-
coj: Ingrid Görans-
son, Kalmar 200 kr;
Leif Nordenstorm,
Boden, 150 kr; Len-
nart Sundman, Väs-
terås, 100 kr; Gö-
ran Lundgren,
Stockholm, 100 kr,
Tore Johansson,
Kalmar, 100 kr;
Signhild Johansson,
Kalmar, 100 kr;
Börje Andersson,
Skövde, 100 kr;
Bengt Nordlöf,
Stockholm, 84 kr;
Sten Anders Han-
nerz, Skotgås, 84
kr; Wim Posthuma,
Västerås, 50 kr.

MEMORE AL NILS
ERIK KROSTOFER-
SON
Jan Setréus, Johan-
neshov, 300 kr.

KONTRIBUO AL
SEF-PARTOPRENO
EN LERNEJA FO-
RUMO
Gunnar Olsson,
Skövde, 2000 kr.

FONDAĴO 70+
Bengt Joelsson,
Stockholm, 140 kr;
Majken Svensson,
Kungälv, 70 kr;
Hans Hjortzberg-
Nordlund, Särö,
300 kr.

ALIAJ DONACOJ
Erik Modalen, Ann-
derstad, 300 kr;
Maria Laire, Stock-
holm, 50 kr.

SEF kore dankas
pro donacoj. Novaj
donacoj bonvenaj
al SEF-poŝtgiro
2012-3.

terkultura kunlaboro. Fine, lerni Es-
peranton faciligas la akiron de aliaj
fremdaj lingvoj. Esperanto tiucele
montriĝas ora ŝlosilo.

Nia celo estas trovi ne-indiĝenajn
organizaĵojn kiuj pretus financi tiun
projekton plejparte. La kostoj de la
unua fazo estas taksataj je US\$
150.000,00 – el kiuj la Instituto Nar-
wal kovros 20%.

Tiuj ĉi supraj informoj pri
Indiĝenaj dialogoj estas ne tute novaj.
La Espero kun granda intereso sekvos
novajojn pri ĝi.

La 52-a KELI Kongreso 2002 en Berefordo.

El Svedio ni estis 6 personoj, kiuj
partoprenis la kongreson en Hunga-
rio.

Ni estis 50 kongresanoj el 12 landoj.
La temo por la kongreso estis Limoj.
Sabate venis la kongresanoj kaj ves-
pere estis interkona kun prezentado
de la internaciaj estraranoj kaj de tiuj,
kiuj pli frue ne partoprenis kongre-
sojn. La malfermo okazis dimanĉe. J.
Tuinder bonvenigis nin ĉiujn. Post la
tagmanĝo estis ripozo. Sabate kaj di-
manĉe mi baniĝis en varma akvo.

Estis diversaj prelegoj. Philippe pa-
rolis pri kunvivado en la socio kaj
Stegfried Krüger pri Sankta Francisko.
Aliaj prelegoj temis pri Estonio, ebloj
kaj limoj de kuracisto k.t.p.

Duonan tagon ni vizitis Karcag per
buso. Tie ni vidis muzeon kaj preĝ-
ejon. La tuttagan ekskurson estis al
Debrecen. Ni vidis la katedralon, mu-
zeon, la universitaton kaj povis
manĝi kunprenitajn panojn. Iomete
ni povis aĉeti. Bedaŭrinde multe plu-
vis. Alia bona ekskurso estis tiu al
Hortobágy, la hungara stepo.

Mi mem povis havi du prelegojn,
pri Anna kaj Karl-Olof Sandgren kaj
ilia Esperantomisio. Poste sekvis la
prelego pri Lina Sandell kaj ni kantis
kelkajn de ŝiaj kantoj esperante. Lun
vesperon ni povis vidi folkloran muzi-
kon kaj dancojn de infanoj. Jaŭde ni
havis la diservon kun sankta manĝo.
Vendrede estis la gaja adiaŭa vespe-
ro. Ni kvar svedoj devis sabate je 3.30
eliri de niaj litoj por en bona tempo
veni al Budapeŝto. Je la 16-a mi jam
estis en Stockholm. Estis agrabla ku-
nestado en la reformita konferenca
hejmo kaj estis ĝoja pro agrabla ku-
nestado.

Arne Lundkvist

Someraj Kursoj en Lesjöfors

En la jam de longe konata Esperanto-
Kurso en la Vermlanda pejzaĝo oka-
zis divers-nivelaj kursoj de la 24a –
30a de junio 2002.

Interese estas, ke eĉ knabinoj ekde
6 jaroj diligente lernis kaj kantis ler-
nigajn kantojn.

(Tiaj kantoj instruas pri tagnomoj,
kutimaj vortoj kaj la uzadon de ek-
zemple la sufikso "mal" ktp).

La knabinoj ankaŭ kune kun la
gvidantino Beatrix Svenonius prepara-
ris la teatraĵon "La knabino, la lupoj
kaj la sorĉistino", dum kiu la hundo
Tjabo havis gravan rolon kiel la lupoj.

Alia interesa aspekto de tiuj kursoj
estas, ke partoprenis ses volontuloj el
diversaj landoj de la laborbrigdo IAL.
Kune kun tri aliaj komencantoj, ili di-
ligente studis Esperanton sub gvido
de Torun Jansson. Ili kreis agrablan
etoson kune kun la aliaj 30 partoprenintoj.

Mi speciale volas menci, ke fakte
du de ili, Sara Stymne kaj Viktor Söder-
kvist sekvis la daŭrigan grupon
kaj ricevis premion de la gvidanto Ge-
orgo Handzlik.

Dum la lasta (internacia) vespero,
kelkaj IAL-anoj prezentis sin kiel pop-
kant-grupo. La nederlanda drumisto
Job uzis kelkajn kuirejajn objektojn
dum la drumado de la prezentado.
Okazis multe pli da prezentadoj kaj
ludoj, ankaŭ aliaj vesperoj. Tiu ĝi es-
tas nur ekzemplo de la agrablaj kun-
venoj.

Post la kurssemajno, la IAL-anoj
restis por beligi kaj plibonigi de do-
mon. Ili i.a. farbis la lignaĵojn de la fe-
nestroj laŭ la reguloj kaj farbis la me-
talajn palisarojn de la ŝtuparo kaj bal-
konoj. Ankaŭ estas mencienda la pre-
tigo de granda bela longa ŝildo kun la
vorto "Esperanto-Gården". La anoj
jam bone regas la anglan kaj pro tio,
ili uzis ĝin kompare kun la grupo, kiu
pasintjare helpis post la kurso. Por
interkompreniĝo tiuj uzis Esperanton

Alia grupo estas la konversacia
sub gvido de Nataša Bertse. Ŝi kaj Ge-
orgo prizorgis la komunajn kunve-
nojn posttagmeze kaj kelkfoje vespe-
re kantante kaj gitarludante.

La ĉarma familio Handzlik de Pol-
lando estis la nuraj eksterlandanoj
krom tiuj de IAL. La du filinoj Domi-
nika kaj Monika kun granda intereso
partoprenis la aranĝojn.

Wim Posthuma

Tutpaĝa artikolo en Kyrkans tidning

En la svedlingva svedeklezia revuo
Kyrkans tidning, kiu eldoniĝas en
49800 ekz., en numero 31/32 aperis
tutpaĝa artikolo pri la nova esperan-
ta himnaro "Adoru" kaj pri Åke Ahl-
rén, kiu tradukis 25 el la himnojn el la
sveda en esperanton.

La artikolo apartenas al la serio
"somera himno", kiu diversmaniere
traktas himnojn. En la artikolo oni
ankaŭ citas kelkajn liniojn el la tekstoj
de kvin konataj svedaj himnoj en es-
peranta traduko, tiel ke la legantoj
povas diveni pri kiu himno temas.

Åke Ahlrén ankaŭ havis ŝancon
rakonti kiel li ekhavis intereson pri es-
peranto. Li rakontis ankaŭ pri la arto
traduki himnojn. Oni devas esti "ho-
nesta al la enhavo", kaj oni devas ne
"plibonigi" la enhavon. Kiam li dradu-
kis "Floradas nun la tero" (Den bloms-
tertid nu kommer) en la komenco ĉir-
kaŭ 1960 li bezonis du jarojn. Nur
post tiu tempo li estis kontenta.

Leif Nordenstorm

Daŭrigo de p. 10 pri "Disleksio":

la profesiuloj tute ne scias, ke ekzistas
tuta aro da bazaj lertaĵoj kiujn oni de-
vas instrui al la infanoj antaŭ ol oni
povas sukcese instrui al ili la legadon.
La dua kialo estas, ke ili ne scias kiuj
tiuj lertaĵoj estas, kaj la tria kialo es-
tas, ke ili ne scias KIEL oni instruas ti-
ujn lertaĵojn.

Estas humiliga penso, ke Immanu-
el Kant – kaj probable ankaŭ multaj el
liaj samtempuloj – verŝajne sciis tion.
Fakte, ĝis antaŭ nur kelkaj generaci-
oj, preskaŭ ĉiuj gepatroj kaj instru-
istoj ankaŭ tion sciis. Nun neniu sci-
as, kaj tiom longe kiom daŭras tiu
nescio, tiom longe ankaŭ la nombro
de disleksiuloj kreskos.

La scienco evidente ne progresas,
kiel multaj emas kredi. Ĝi regresas.
Estas tragike, ke infanoj devas suferi
pro nia kreskanta nescio. Eĉ pli tragi-
ke estas, ke ni kulpigas la infanojn pro
nia nescio.

Tiuj, kiuj deziras ekscii kiel instrui
al siaj infanoj la bazajn lertaĵojn men-
ciitajn en tiu ĉi artikolo, povas viziti
retpaĝon www.audiblox2000.com,
kie ili lernos pri tre efektiva programo
kiu ebligas al ĉiu patro aŭ patrino in-
strui al sia infano tiujn lertaĵojn – kaj
tiam, for la disleksio, cerba misfunk-
cio kaj lernodifektaĵoj.

D-ro Jan Strydom

Kio estas disleksio?

Oni nur povas venki disleksion se oni komprenas, ke la kaŭzo de la problemo estas la fakto, ke ekzistas bazaj lertaĵoj kiujn la koncerna persono ankoraŭ ne primajstris.

Etimologie la vorto "disleksio" devenas de grekaj vortoj, kaj la laŭvorta signifo estas "malbona legado." Kutime oni uzas la vorton aludante homojn – kaj infanoj kaj plenkreskuloj – kiuj spertas malfacilaĵojn pri la legado, la literumado kaj la skribado.

Pri la demando kio la disleksio vere estas, kaptas ĝenerala malkonsento. La germana oftalmologo, R. Berlin, unue uzis la terminon por aludi la legomalpovon de pacientoj kiuj suferis lezon je la maldekstra flanko de la cerbo. En la posta jarcento ĉi tiu limigita signifo, kiun Berlin donis al la vorto disleksio, multe plilarĝiĝis. Jam ĉe la mezaj 70-aj jaroj de la antaŭa jarcento, la signifoj de la vorto ampleksis epidemiecan kondiĉon, kiu, malgraŭ la fakto, ke ne ekzistas ĝenerale akceptitaj simptomoj, tamen kaptis la intereson de tutaroj da profesiuloj, inkluzive de pediatroj, neŭrologoj, edukadaj psikologoj kaj multaj aliaj.

Spite tiun atentegon, ankoraŭ ne ekzistas ia konsento pri kio disleksio estas aŭ pri kio oni devas fari pri ĝi. La neevitebla rezulto estas, ke la nombro da infanoj, kiuj ne sukcesas primajstri la skribitan vorton, daŭre plimultiĝas.

La plej vaste akceptita opinio pri la disleksio estas, ke temas pri laŭdira "lernodifektaĵo." Tio implicas, ke la cerbo de la koncerna persono estas iel misfunkcia. Ekzistas, tamen, nenia interkonsento pri precize kio tiu misfunkcio ja estas. Cetere, nenia konfirmo iam troviĝis por subteni tiun ideon de cerba misfunkcio. Jam dum jardekoj ĝi restas nura supozo.

Tio indikas, ke la popularaj ideoj pri disleksio estas science tute senbazaj. Ili baziĝas sur nuraj supozoj, kiuj siavice ankaŭ baziĝas sur aliaj nuraj supozoj. Aliflanke, la tezo, ke metaloj pligrandiĝas kiam varmigataj, estas scienca fakto kiun ĉiu ajn povus konfirmi. La tezo estas konfirmebla kaj en la praktiko ĝi efikas. La supozo pri cerba misfunkcio jam re kaj ree pruvigis esti nekonfirmebla. Eĉ pli grave estas, ke ĉiuj kaj ĉiaj terapiaj klopodoj surbazaj de tiu supozo por helpi al disleksiuloj, havas malgrandan aŭ nenan efikon. Ĉio estas nekonfirmebla kaj nenio efikas. Tute certe tio ne povas esti scienco.

La cerba misfunkcio, kiun oni kulpigas kiel la kaŭzo de la disleksio, ĝis

nun ne detektiĝis pere de iu ajn diagnozistika instrumento aŭ metodo. Nur el aro da kondutaj simptomoj oni konkludis, ke ekzistas tia misfunkcio. Tamen, se oni iom pli profunde pristudas unu el tiuj laŭdiraj simptomoj de la supozata cerba misfunkcio, oni rapide trovas, ke ekzistas tute logika klarigo por tiu ĉi simptomo, kiu neniel rilatas al cerba misfunkcio.

Unu el multaj malfacilaĵoj, kiujn spertas disleksiuloj, estas inversigoj. Ili ofte ne kapablas distingi inter **b** kaj **d**, kaj ili ofte skribas "algo" por "aglo." Tra la tuta mondo oni konsideras tiun fenomenon kiel simptomo de la hipoteza cerba misfunkcio, je kiu supozeble suferas la disleksiuloj.

Tiu miskompreno firme apogas la deklaron, jam farita en 1900 far Edmund Husserl, ke la homaj sciencoj sin trovis en kriza situacio. En 1980, Calvin Schrag aludis al la homaj sciencoj kiel ŝanceliĝanta Babelturo. Konsidere tiujn eldirojn, estas pli ol nur iom embarase konstati, ke antaŭ pluraj jarcentoj Immanuel Kant (1724-1804) jam proponis multe pli logikan klarigon por la problemo de inversigoj kiam li diris: "Ni vidas la aĵojn ne kiel ili estas, sed kiel ni estas."

Homo havas du flankojn, dekstran kaj maldekstran. Tial, kompreneble, oni DUFLANKECE interpretas ĉion kion oni renkontas. Infano, kiu ankoraŭ ne sufiĉe bone lernis sian propran duflankecon, emus ofte misinterpreti la duflankecon de aliaj aĵoj.

La lernoprincipo kiun oni devas noti ĉi-rilate estas, ke la lernado estas tavoligita okazaĵo. Tio signifas, ke la lernado progresas laŭ specifa sinsekvo, kaj por certigi sukcesan lernadon oni devas zorge instrui laŭ tiu sinsekvo. Ekzemple, oni ne povas UNUE instrui al infano la adiciadon kaj la subtrahadon, kun la intenco nur POSTE instrui al li la kalkuladon. Infano kiu ne kapablas kalkuli tute ne povus lerni la adiciadon kaj subtrahadon. Sed se oni UNUE instruus al li la kalkuladon, tiam estus sufiĉe simpla tasko POSTE instrui al li ankaŭ la adiciadon kaj la subtrahadon. La lernado, tial, estas kiel suprengrimpi per eskalo; nur se oni jam havas piedon sur la unua rungo oni povus atingi la duan.

Oni devas UNUE instrui al la infano la kapablon ĝuste interpreti sian propran flankecon ĉiam kaj en ĉiuj cirkonstancoj – nur tiam li kapablos ankaŭ ĝuste interpreti la flankecon de aliaj aĵoj. Inversigoj do ne estas simptomo de cerba misfunkcio, sed nur indiko, ke oni ne adekvate instruis al

la infano sian propran flankecon, kaj tial li emas misinterpreti la flankecon de aliaj aĵoj, kiel **b** kaj **d**.

Sammaniere, ĉiuj la aliaj indikoj de disleksio, kiujn oni ĝenerale alrigardas kiel simptomoj de cerba misfunkcio, efektive nur estas indikoj de bazaj lertaĵoj kiujn la infano ankoraŭ ne adekvate lernis. Kiel plua ekzemplo, ni konsideru infanon kiu ne kapablas distingi vortojn parolataj en bruega fono. Tia infano neniel estas misfunkcia, li nur ne adekvate lernis aŭde distingi inter fono kaj malfono. Alia infano, kiu tre malbone literumas, ankaŭ ne estas misfunkcia. Oni nur ne adekvate instruis al li la bazan lertaĵon korekte analizi aĵojn en sinsekvo.

Ĝis antaŭ kelkaj jardekoj, kiam gepatroj ankoraŭ sekvis tradiciajn metodojn por eduki siajn infanojn, ĉiuj gepatroj sciis, ke ekzistas aro da bazaj lertaĵoj kiujn ili devas instrui al siaj infanoj ekde tre juna aĝo, por ke ili estu kapablaj lerni legi kiam ili iras al lernejo. Ĉiuj gepatroj sciis, ke estis ilia devo helpi al la infano suprengrimpi per la unuaj kelkaj rungoj de la lerneskalo, por ke la instruisto poste povu transpreni la taskon kaj sukcese helpi al la infano plue suprengrimpi.

La Naturo-Eduko batalo jam furiozas en psikologiaj kaj edukaj cirkloj dum jarcentoj. Antaŭ kelkaj jardekoj la ideo de la evoluismo farigis tiel populara, ke ĝi sukcesis enplanti en la mensojn de homoj la ideon, ke la infano naskiĝas tute preta, kiel besto, kaj ke la lernado estas nura liliputaĵo rilate la disvolviĝon de la infano. Rezulte, psikologoj, edukistoj kaj instruistoj komencis tre severe averti gepatrojn kontraŭ la "danĝera" kutimo instrui al siaj infanoj. "Atendu ĝis kiam via infano iras al lernejo. La instruistino devas instrui al li; ŝi scias kiel, vi ne scias. Vi nur malĝuste instruas vian infanon. Kiam poste li iras al lernejo, la instruistino devas malŝpari multe da tempo por forigi la damaĝon kiun vi kaŭzis."

Tial gepatroj ĉesis fari la gravan kaj absolute necesan laboron kiun patroj kaj patrinoj faris tra generacioj. La rezulto estis kvazaŭ oni desegis la unuajn rungojn de la eskalo. La neevitebla rezulto estis disleksio, lernodifektaĵoj, cerbaj misfunkciaĵoj kaj arego da cerbomalsanoj kaj sindromoj.

La kialo kial disleksio ĉi-momente estas universala problemo do neniel tuŝas cerban misfunkcion. La unua kialo estas, ke gepatroj, instruistoj kaj

Daŭrigo en p. 9.

GUNNAR GÄLLMO

KELKAJ FAKTOJ PRI LA BUDHISMO



e Förlagsföreningen Esperanto
Eldona Societo Esperanto

Gunnar Gällmo: Kelkaj faktoj pri la budhismo. Eldona Societo Esperanto. Stockholm 2002. 77 paĝoj.

Ekzistas du diversaj specoj da religiaj libroj. La unua speco estas libroj pri religio: sciencaj kaj popularsciencaj libroj kaj lerniloj por lernejoj en ekzemple Svedio, kie la religia instruado en la lernejoj estas principe priskriba.

El Svedio pri budhismo

Tiaj libroj ne propagandas iun apartan religion.

La alia speco estas religiaj libroj, kiuj estas verkita el la vidpunkto de kredanto. Tia libro estas "Kelkaj faktoj pri la budhismo", verkita de Gunnar Gällmo, mem budhano. En la libro, la verkinto priskribas Budhon, dharmon kaj sanghon, alivorte la instrumenton, la instruon kaj la instruataron. Oni povus diri ke la libro estas longa eseo. La aŭtoro ne funde traktas ĉiun aspekton de la temoj, sed tiujn, kiuj laŭ li estas gravaj, kaj ilin li komentas kaj iam komparas kun kristanismo kaj islamo. Gällmo ne evitas kritiki kristanisman kaj islaman, sed li ankaŭ ne timas kritiki opiniojn de budhanoj, kiujn li opinias nekorektaj. La verkinto ekzemple malakceptas ke budhano devas esti vegetarano, kaj skribas ke tio estas ideo de postaj tradicioj kaj de la perfidulo Devatadda, sed ne de Budho mem.

"Kelkaj faktoj pri la budhismo" montras grandan intereson pri lingvaj aferoj. La verkinto diskutas pri tiuj budhanaj faktermoj, kiujn oni uzu en Esperanto, kritikante multajn difinojn en Plena Ilustrita Vortaro. (Espe- reble la kritikoj atingis la redakcion de la nova eldono de PIV, en sufiĉa tempo antaŭ la ĵusa apero de la nova eldono.)

Mi fakte havas kialon aldoni nur unu terminon. Kiam Gällmo skribas pri "Big Bang" en p. 33, ŝajnas ke li ne konas la Esperantan terminon "pra-

eksplozo". (Cetere ankaŭ mi ne konis ĝin ĝis kiam mi serĉis ĝin por verki tiun ĉi recenzon.)

La ĉapitro pri Budho priskribas la situacion en la lando dum la vivo de Budho, kiam, koncize priskribas lian vivon kaj informas pri la enhavo en kelkaj el liaj paroloj.

La dua ĉapitro pri la instruo (Dhar- mo) kaj klopodas koncize informi pri la ĉefaj trajtoj de la instruo, kaj persone diskutas pri diversaj aferoj. La verkinto i.a. demandas kiel la bhikŝuoj (budhanaj monaĥoj) en Stokholmo kaj Londono ne klopodas finiĝi reĝan ĉasadon, ĉar tio devus esti ilia tasko.

La tria ĉapitro pri la instruataro (Sangho) priskribas la historion de budhismo ekde la komenco en Hindio, la evoluon precipe en Sudazio kaj en Eŭropo.

La libro finiĝas per glosaro.

La aspekto de la libro estas simpla. Pli korekte estas paroli pri presita kajero ol pri libro. La enhavo estas bela; tamen estus dizirinde ke la kovrilo estus iom pli luksa por ke oni povus paroli pri vera libro. Nun estas unukolora nigra presado sur flava papero. Dukolora (nigra kaj ankoraŭ unu) presado sur blanka papero plibeligus la libron.

Kelkajn faktojn pri la budhismo mi povas rekomendi al ĉiu, kiu interesiĝas pri religioj, aŭ pli precize pri budhismo.

Leif Nordenstorm

VORTOJ DE LA REDAKTORO

"Io" devos esti pli bona

Antaŭ preskaŭ unu jaro mi pensis ke eble mi povos akcepti la taskon redakti La Esperon. Mi estis preskaŭ tute pasiva esperantisto dum kelkaj jaroj, pro laboro, infanoj k.t.p. Kiel multaj mezaĝuloj mi spertis ke la mezaĝa vivo estas sufiĉe streĉa, kvankam ĝi samtempe povas esti feliĉa. (Pri tio mi eble skribos je alia fojo.)

Mi volas danki ke mi ricevis bonan subtenon de pluraj homoj. Multaj esperantistoj sendis artikolojn, informojn kaj fotojn. Kvankam redaktoro neniam povas aperigi ĉion kion li ricevas, mi ĝojas pro ĉiu letero.

Mi aparte volas danki al Franko Luin, kiu multe helpis al mi pri diversaj aferoj, kaj al Carl-Erik Olsson, kiu

lanĉis novan ideon presi La Esperon en Skövde, kio redonis al la revuo bonan aperritmon, sed mi devus menci ankaŭ aliajn, tamen mankas spaco.

Pli bone io ol nenio

Dekomence mi laboris laŭ la esperanta proverbo "Pli bone io ol nenio", kio signifas ke estas pli bone ke La Espero aperos kun iom da eraroj, ol ke ĝi aperos tre malfrue. Ni regajnis la aperritmon, sed bedaŭrinde estis tro multe da prezeraroj. Mi menci la plej ĝenan. En LE 2002:3 estas rubriko "Ordpyssel" sur p. 6. Ĝi volas instrui al neesperantistoj la esperantan vortfaradon. La vorto "berg" menciĝas dufoje. Dekstre devus esti "bergskedja".

Bonvolu korekti, se vi montros al neesperantistoj.

Pri la prezeraroj respondecas nur mi, neniu alia.

Pli bone estonte

Mi klopodos fari pli seneraran revuon estonte, ĉar nun mi pli bone regas la komputilajn programojn, tiel ke mi ne devas uzi tro da atendo al tio. Mi tamen promesas ne seneraran, sed nur "pli seneraran", ĉar revuo ĉiam enhavas erarojn. Ĝi ĉiam estos verkita dum manko da tempo. Pri tio konsentas ankaŭ profesiaj ĵurnalistoj.

Leif Nordenstorm

Sten Svenonius
Vendelsfridsgr 4C
21764 Malmö

**B FÖRENINGSG-
BREV**

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm



En Esperanto-Gården, Lesjöfors okazos dum semajno 39, 2002:

1) Jarkunveno koncerne Esperanto-Gården, sabate, 28 septembro 09.00
2) Sveda Esperanto-Instituto kunlabore kun Esperanto-Gården invitas al dutaga seminario pri lingvaj aferoj kaj al Jarkunveno de la Instituto, 28 – 29 septembro 2002

Sabate 28 septembro

12.00 – 13.00 Lunĉo
13.00 – 14.30 Prelego de **Atilio Orellana Rojas**: "Indiĝenaj Dialogoj – Renkontoj en la Esperanta mondo."
14.30 – 15.00 Kafo/teo
15.00 – 16.30 Prelego de **Ralf G. Fröhlich**: "Informado pri Esperanto -ana lizite laŭ profesiaj varbmetodoj."
18.00 – 19.00 Vespermanĝo
19.00 – 20.00 "Esperantaj kursoj – kaj poste?" Interŝanĝo de spertoj"
(**Bertil Nilsson, Atilio Orellana Rojas, Ralf G. Fröhlich**)
20.00 – Distraĵo, **Marina Korot** kantas kaj ludas proprajn kantojn.

Dimance 29 septembro

8.00 – 8.45 Matenmanĝo
9.00 – 10.00 Prelego de **Ralf G. Fröhlich**: "Esperanto@Interreto – la aktualaj projektoj de la esperantoj: movadoj en la Interreto".
10.00 – 10.15 Paŭzo
10.15 – 11.15 Prelego de **Atilio Orellana Rojas**: "La muziko kaj kulturo en la Inkaa Imperio."
11.15 – 11.45 Kafo/teo
11.45 – 13.00 **Jarkunveno** kaj finiĝo
13.00 – 14.00 Lunĉo

Ĉiuj estu kore bonvenaj!

Lars 0586-548 11, Bo 031-91 85 54, Bertil 0415-501 52, Inga 031-15 57 23, Siv 0302-411 49.

Konferenckotizo. A 375 SEK

Restado. Vendredo-Sabato-Dimanĉo (27-28-29 sept)

La prezo inkluzivas ĉiujn manĝojn de vendredevespere (supo + buterpano)

ĝis lunĉo dimanĉe kaj du tranoktoj.

B1 850 SEK 1-lita ĉambro

B2 810 SEK/po persono 2-lita ĉambro

B3 650 SEK/po persono plurlita ĉambro

Nur tranoktoj sen manĝoj. Troviĝas kuirejo por propra mastrumado.

B4 550 SEK 1-lita ĉambro

B5 510 SEK/po persono 2-lita ĉambro

B6 350 SEK/po persono plurlita ĉambro

Sabato – Dimanco (28.29 sept). De

lunĉo sabate ĝis lunĉo dimanĉe.

Unu tranokto.

C1 620 SEK 1-lita ĉambro

C2 600 SEK/po persono 2-lita ĉambro

C3 475 SEK/po persono plurlita ĉambro

Nur tranoktoj sen manĝoj. Troviĝas kuirejo por propra mastrumado.

C4 320 SEK 1-lita ĉambro

C5 300 SEK/po persono 2-lita ĉambro

C6 175 SEK/po persono plurlita ĉambro

La prezoj inkludas ankaŭ kostojn por konferencoj, purigado post la seminario kaj eventuala materialo. Kunportu lit- kaj mantukojn, alie vi devas pagi aldone (60 SEK).

ALIĜO: Pagu al pĝ. 5 15 11 – 4, Svenska Esperanto-Institutet.

Notu vian mendon sur la talono. ekz. konferenckotizo (A) + restado (B, C...1-3) kaj induku ĉu vi deziras vegetaran aŭ alian specialan manĝon. Pagu kaj mendu en bona tempo antaŭ la seminario. Tio faciligas la administradon. Dankon! Dum la seminario estas antaŭtagmeza kaj posttagmeza kafo haveblaj. Pagu surloke. Se iu deziras alveni kelkajn tagojn antaŭ la seminario aŭ resti post la seminario, bonvolu kontakti Lennart Svensson, Esperantogården, kiu povas oferti favorajn prezojn.

Se vi havas demandojn pri la vojaĝoj, bv. telefoni al Lennart Svensson: 0590-309 09!